Mrs. ALEC L. REA, *Highground, Waterford-road, Axton, Birkenhead*; Miss J. M. INMAN, 6, *Colchester-road, Halstead, Essex*; A. BULL, *Bernard's, Cottenham, Cambs.*; R. CARTER, "*Carsdale, Cardwell-road, Garston, Liverpool*"; H. S. ALLNUTT, *Cargilfield, Barn-ton, Edinburgh*; W. T. STEAD, 14, *Norfolk-street, London, W.C.*; JAMES M. DOW, 16a, *Abercromby-square, Liverpool*; C. A. FAIRMAN, 70, *Romola-road, Herne-hill, S.E.*; J. C. HASSACK, 5, *Union-road, Macduff, N.B.*; SYDNEY TAYLOR, *Buxton*; G. M. WOODROW, 14, *Sorbie-street, Maryhill, Glasgow*; R. MILES, 8, *Upper Village, Hawick*; Miss EMILY E. LUCAS, 61, *Aberdeen-road, St. Denys, Southampton*; T. D. JAMES, 32, *Park-lane, Croydon*; H. LAURIE, *Jubbulpore, India*; H.S.H. DUKE LITTA-VISCONTI-ARESE, LL.D., Ph.D., etc., etc., *H.S.H. DUCHESS LITTA-VISCONTI-ARESE, Casale-Litta, Lombardia, Italy.*

NEW FELLOWS.

Miss MARION HUGHES, *Liverpool*; Miss E. S. MUIR, *Edinburgh*; A. GRIFFIN, *St. Helens*; C. H. SATTERLY, *Harrow.*

DONATIONS.

Messrs. RUSTOMJEE DIVECHA AND Co., *Ahmedabad, India*, £25 5s. 10d.; Messrs. JAMSETJEE NOWROJEE KAPADIA AND Co., *Bombay*, £15; CLARENCE BICKNELL, Esq., F.B.E.A., 10s.; Miss H. E. BOORD, 10s.; E. H. STOUT, Esq., 5s.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

(*Atesto pri Kapableco.*)

P. B. GOETZ, *Buffalo, N.J., U.S.A.*; J. HAMPTON, *Christchurch, New Zealand*; J. E. PICKLES, *Durban, Natal, S.A.*; *O. H. MAYER, *Chicago, U.S.A.*; *JOSEPH HADALL, *Blackpool*; C. MANN, *Westport, New Zealand*; *SYDNEY TAYLOR, *Buxton*; Mrs. MARY R. CHIPMAN, *Philadelphia, U.S.A.*; *Dr. D. O. S. LOWELL, *Boston, Mass., U.S.A.*; F. B. HARDIN, *Rockford, Ill., U.S.A.*; Rev. R. P. ANDERSON, *Christiania, Norway*; C. H. MOLLOY, *Goole*; *WM. TONER, *Rutherglen, Glasgow*; FRANCIS ALMY, *Buffalo, N.Y., U.S.A.*; *CHAS. J. EDWARDS, *Gibraltar*; MARTIN QUENZER, *Philadelphia, U.S.A.*; WM. AMPT, *Cincinnati, Ohio, U.S.A.*; Miss H. E. S. COTTERELL, *W. RAE, L. J. CAW, Edinburgh*; *R. D. BROWN, *Miss H. H. JONES, Miss J. G. MOONEY, *Liverpool*; H. R. LAWLESS, *London*; W. W. HALL, *Kilburn*; J. C. WILSON, *Harrow.*

Correction.—In June number, J. E. COOMBE, *Oswestry*, should be *Abergystwyth.*

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

Miss JOSEPHINE GENTLE, Miss MARION ALEXANDER, *JOHN BOWIE, *JAMES MALLOCK, *Miss J. SCOTT, *Miss D. McDONALD, JOHN BROWN, W. E. REDDING, *Miss E. SUTHERLAND, Miss A. L. MACKAY, *R. MATHISON, Miss M. C. CAMPBELL, *W. MATHISON, *Miss A. B. DEANS, *Miss B. H. WANLESS, Miss A. H. S. BOWIE, *Edinburgh*; *Mrs. MARGARET TONER,

Glasgow; *Miss MARY COOK, Nottingham; *E. J. RIMMER, *Miss E. APPLETON, Liverpool; *F. GEARY, St. Leonards; Miss CLARA SYMONDS, Bexley; *W. C. FREEMAN, *Miss E. S. SEER, *F. M. DREWERY, *H. W. MUGGLESTONE, F. M. LOWE, F. W. ALMOND, S. SCATTERGOOD, Leicester; J. FRASER, Leith; E. STAPLES, Chislehurst; *G. O. GOSLING, Crofton-park; E. WOLVERTON, Bermondsey; *Miss P. J. OKELL, Ealing; *E. J. BRIERLEY, St. Helens; A. J. ROMERIL, Stoke Newington; R. K. MCCONWAY, Miss MARY SMYTH, J. R. JESSIMAN, C. G. PAXMANN, JAMES HUNTLEY, Hebburn-on-Tyne; Miss A. ANDERSON, Miss MAY KIDD, Jarrow-on-Tyne; Miss MARY FOSTER, Pelaw-on-Tyne.

* Denotes that the candidate has passed with distinction.

RECENT LECTURES.

May 27.—STOCKTON-ON-TEES. Borough Hall. Professor A. Christen. Mr. J. J. Prest, Headmaster of the Higher Grade School, in the chair. As a result of the meeting and the week's course of lessons which followed, a group of about fifty has been formed.

June 3.—LONDON UNIVERSITY. Mr. G. J. COX delivered a lecture before some thirty University Extension lecturers and others, Professor John Adams presiding. Much interest was aroused.

June 3.—MIDDLESBROUGH. Victoria Hall. Professor A. Christen. Chairman, the Mayor (Councillor W. Roberts). A crowded and enthusiastic audience. "The lecturer's visit has created the most lively interest among all classes. Esperanto is the one topic of conversation. At the street-corners, in the office, at the fireside, everybody is asking for information or discussing the merits of this wonderful creation of Dr. Zamenhof."—*The North Star*, June 10. Mr. Christen gave his usual week of lessons in the language and since then a strong group has been formed.

COMING EVENT.

July 1.—EASTBOURNE. Prof. A. Christen will open his Esperanto week here by a lecture on this date in the Pavilion, Devonshire Park. The Mayor, Ald. H. W. Keay, J.P., will take the chair. The lecture will be followed by a Course of Four Lantern Lecturettes, every evening up to Friday, the 5th. We appeal to all *samideanoj* in the town and district to do what they can to help Mr. Christen and make his week's work a great success. *Vivu Esperanto!*

ALVOKO AL LA LEGANTOJ.

Mallumo. Mallumo absoluta kaj senespera, ĉar ĝi neniam rompiĝos. Tia estas la atmosfero, en kiu vivadas tiuj, kiuj perdis sian okulvidon. La plinombro el niaj impresoj trafas la carbon tra kaj per la okuloj. Tiel al la blinduloj mankas tiu esenca, viviga ĝojo, kiun ni aliaj, kiuj *vidas*, havas la povon ĝuadi ĉiun momenton el nia vivado—ĝojo pro beleco de formo kaj koloro, pro la fiera oro de l' tago kaj la dolĉa lazuro de la vespero—kaj tamen, la blinduloj versajne estas pli sentemaj ol ni, kiuj vivas en la brilego de la tago; ili vivas pli proksime de la mistera fonto de beleco, ĝin vidante pli klare pro la cirkaŭanta mallumo. Ili estas pli sentemaj—sentas pli ege doloron kaj plezuron, ol ni pli maldelikatuloj.

Estas al miaj kunmaldelikatuloj, ke mi direktas

tiun ĉi alvokon. Ni donu, laŭ nia eblo, almenati kelkan parton de tiu plezuro al niaj malpli feliĉaj gefratoj, kiun ni mem estas ĝuontaj. Ni, feliĉuloj, kiuj vidos la mirindajn belaĵojn de Cambridge kaj renkontos tie malnovajn amikojn—*kaj povos ilin vidi!*—kaj novajn interesojn; ni feliĉuloj, kiuj ĉintage ĝuas, sed tre malofte pripensas aŭ prodankas la dian benon, kies mirindecon la kutimo kaŝas antaŭ nia kompreno—ni sekvu ekzemplon, kiun jam donis al ni kelkaj aĵilantaj samideanoj. Tiuj ĉi tiel efektive pripensis la terurecon de la malluma soleco de la blinduloj, ke ili dankoferis sian laboron kaj monon por iom mallumigi kaj ekrompi tiun solecon, farante monkoklekton por ebligi al kiel eble plej multaj blinduloj alveturon kaj loĝadon en Cambridge dum la Kongreso. Ĉu nia kompato estas malpli dolĉa kaj nia dankemo malpli korsentita? Kiel dankoferon, ni *tuĵ* sendu, *alie estos tro malfrue*. S-ro Adams, de 6, *Plylimmon-terrace, Hastings*, sindoneme entreprenis la organizadon kaj monkoklektadon kaj malfermis la liston per donaco de unu funto stg. (10 spesmiroj).

ARTHUR GRAY.

UNUA LISTO.—Alfred J. Adams, £1; Redakcio de THE BRITISH ESPERANTIST, £1; F-ino C. Squire, 5s.; Arthur Gray, 2s. 6d.; C. W. T. Reeve (9,700), 2s. 6d.; F-ino S. L. Adams, £1; C. F. Hayes, 2s. 6d.; S-ino Nicholl, 2s. 6d.; H. B. Mudie, 1s.; D. H. Lambert, 2s.; Wm. Phillimore, 1s.; A. Blott, 1s.; W. W. Hide, 2s.; F-ino Lawrence, 2s.

Karaj Samideanoj!—Dum ni ĝoje ĉi tie ĝuas la belecon de la Naturo, kiun la helaj radioj de lumo envolvas en brila mantelo; dum ni admiras la verdajn tapiŝojn herbajajn, la diverskolorajn florojn, la majestajn arbojn; unuvorte ĉion, kion al ni montras niaj okuloj, ĉu vi pensas pri la malfeliĉego de tiuj plendemuloj malfavoritaj de la sorto, kiuj ŝanceliĝe paŝas en la mondo nesciante ĝian mirindecon? Ĉu vi povas imagi la kruelecon de la destino de altpensema estaĵo, kiu estas senigita de la plej akre plezuriga sento: *La vido?* Kiu palpe iras, konante nek la helon de bela somera tago, nek la nebulon de mistera vintra vetero?

Mallumo, Malhelo, ĉie mallumo, ĉie malhelo! Ili amas, ne vidante amatinon, Ili parolas ne sciante ĉu oni ilin aŭskultas, Ili vivas ĉiam timante, ke ili falos en ian neatendatan abismon. Ili vivo similas tiun de homo kiu sendese laŭirus ĉian danĝerplenan vojeton borderantan profundegaĵon kaj ĉiam timante la falon en la senfundajaĵon.

Nevido, Nescio, Timo! Jen resume ilia stato!

Kompatu ilin! Konsolu ilin! Helpu ilin!

C. BOURLET.

Wild's Hotel, Ludgate-hill, London.

Per Esperanto ni vere povas helpi ilin kaj, por montri al la mondo tiun eblecon, ni deziras kunvenigi en la Kejmbrigān kongreson kelkajn geblindulojn sed, ĉar la plimulto estas nature malriculoj, necesas ke ni elportu parton de la elspezoj.

Ni do petu, je la nomo de la Brita Esperantista Asocio, ke ĉiu grupo sendu al ni sumon, sumeton.

La blinduloj, antaŭ ĉio, tre ŝatas Esperanton, ĉar per tiu ilo, ni povas internacie disvastigi, multe pli malkare, punktuskribitajn libretojn por ĉiuj nacioj legeblaj.

Ni klopodas enkonduki senpagan esperantan punktuskribitan literaturan bibliotekon, rondirantan inter la diversaj blindulejoj kaj privataj geblinduloj.

ALFRED J. ADAMS.

ALILANDAJ SCIIGOJ.

Hindujo.—Godhra.—Publika parolado estis donita de S-ro Nanjiani, kun S-ro R. C. Brown kiel prezidanto. En la kunveno ĉeestis estroj de la "Bahai," "Mahomedan," kaj "Hindu" religianaroj kune kun multaj oficistoj, instruistoj kaj studentoj. La okazo finiĝis per la, al ni, interesa faraĵo; la prezidanto, S-ro Bankroft kaj Gesinjoroj Kothwali estis girdandataj. La hindaj sciigoj havas apartan gravecon pro tio, ke nia Prezidanto tie veturadis dum kelka tempo kaj de tie nur ĵus revenis. Per privataj kaj publikaj paroladoj, li ĉiokaze senlace antaŭenpuŝis nian aferon en tiu lando kaj, tial ke lia nomo kaj famo estas en Hindujo tiel bone konata, ĝi ĉie ricevis bonegan reklamon kaj aron da novaj aligantoj. Ĉe la unua ĉiujara kunveno de la Societo en Kathiawad, Jetpur, D-ro Pollen, subtenata de kelkaj potencaj amikoj, faris paroladon al granda aŭdantaro, kiu amase plenigis la ĉambron. En la alt-lernejo en Jamnagar li parolis antaŭ multaj eŭropaj kaj hindaj sinjoroj, kiuj atskultis lin kun granda intereso. En Bombay D-ro Pollen unue intencis fari paroladon en la Komerca ĉambro sed oportuna tago ne estis trovebla, sekve li parolis en la kunveno de la Bombay Y.M.C.A. Liaj multaj rakontetoj kaj interesplena parolmaniero tre amuzis kaj instruis la grandan aŭdantaron. Li sciigis ilin, ke antaŭ nelonge li estis ano de deputacio al la ĉefministro, kiu sin prezentis antaŭ li, por proponi, ke li fondiĝu en Londono lernejon por la orientaj lingvoj. La parolanto forte kontraŭbatalis la ideon, ke Esperanto malhelpas la lernadon de aliaj lingvoj kaj ke anglo estus pli bona patrioto sciante nur la anglan lingvon kaj atdante ĝis aliaj nacioj ellernos ĝin. Post vizito al Gujerat College, Ahmedabad, la sekretario sciigis nin, ke tie fondiĝis grupo havanta 21 membrojn. La urbeĝo posedas 300,000 loĝantojn kaj grandajn industriojn, kaj sekve prezentas grandan kampon por propaganda agado. Pri la agado de D-ro Pollen la hinda gazetaro donas longan priskribon kaj precipe pri la Godra kaj Jetpura kunvenoj, kaj la *Times of India* presis bonan portreton de la famekonata vizitanto. La angla Esperantistaro kore esperas, ke ili povos aŭdi de D-ro Pollen mem paroladon pri lia interesa kaj memorinda vojaĝo. Kelkaj hindaj fratoj sendas al ni eltranĉaĵojn el gazetoj, kiuj unuavide montras literojn iom similajn al la hinaj aŭ hebreaj. Tio ĉi estas, sendube, ankaŭ pluj laŭdoj por D-ro Pollen kaj Esperanto, sed malfeliĉe ni ne povas ilin legi.

Belgiujo.—La grupo en Bruges finis la vintrajn kursojn per sukcesa literatura kaj muzika festo. Inter la ĉeestantoj sin trovas kvindekda membroj de la angla kolonio, multaj sinjorinoj kaj granda aro da oficiroj kaj suboficiroj.

Brazilujo.—Niaj kunlaborantoj sukcesis altiri al Esperanto la publikajn registarojn. La Ministro de Internaj Aferoj donas konsenton por funkciado de kurso en la Nacia Gimnazio kaj la Militoficejo por kurso en la militlernejo en Porto-Alegre. Oni malavare aranĝas belajn festojn por la nacia Kongreso, kiu okazos en Julio, kaj pri tio kaj ĝenerale pri nia afero la gazetaro libere parolas. Oni jam vendis ĉirkaŭ mil ekzemplerojn de la nova lernolibro de D-ro Alberto Viera.

Fintlando.—La apero de la naciaj vortaroj de S-ro V. Andelin, kiujn la Finnoj malpacience atendas, sendube rapidigos nian progreson en la lando.

Francujo.—La prezidanto de la S. f. p. E. faris viziton al la centraj francaj grupoj en Orleans, Blois,

Tours, Niort, La Rochelle, Angouleme kaj Limoges. Ĉie li estis afable akceptita kaj ĉie la gazetoj estis aparte afablaj. La grupo en Eu rimarkigas, ke ĝi estas sur la aŭtomobila trairejo de la 2a de Julio kaj kore akceptos ĉiun aŭtomobiliston, kiu trapasos la urbon. En Toulouse okazis Esperanta festo, pri kiu la Toulouse'a gazetaro longe kaj afable raportis. La Komisio de la Instruado, al kiu estis resendita por ekzameno la propono de S-ro Deputato Cornet pri la oficiala akcepto de Esperanto, kunvokis la 5an de Junio S-rojn de Beaufront, Cart, Sebert, Boirac, Bourlet, kaj Moch. Niaj eminentaj samideanoj estis afable akceptitaj kaj la interparolado, kiu daŭris du horojn, liveris al la komisio multajn interesajn informojn pri nia lingvo kaj ĝia disvastiĝo.

Germanujo.—Plej grava okazo estis la malfermo de la Dua Germana Kongreso en Dresden. Pli ol mil personoj plenigis la grandan ĉambron de la ĉefa kunveno en la "Vereinhaus." La parolado de la tutmonde konata D-ro Ostwald estis la ĉefa okazintaĵo kaj faris grandan impreson. Li traktis pri la helpo, kiun Esperanto povus alporti al la scienculoj, ŝparante al ili la tempon kaj energion, kiujn la ellernado de du-tri fremdaj lingvoj nuntempe postulas. Inter la aŭdantaro sin trovas grandfamaj eminentuloj kaj famekonataj anoj de la registaro, de la magistrataro, de superaj lernejoj kaj reprezentatoj de la scienco kaj la artoj. Aperas sukcese la "Eho Esperantista," monata aldono de la Berlin'a "Das Echo" ĉiusemajna politika, arta, kaj scienca gazeto. Paroladoj estas donitaj en multaj urbegoj, Frankfort, Magdeburg, Pirna, Graz, Stuttgart kaj aliaj. Niaj germanaj kunfratoj faras al ni imitindan ekzemplon, nome: ke en ĉiu okazo ili celas kunligi kun ni la potencajn unuigojn kiel nome: la Ruĝa Kruco, Stenografiistoj, Laborantaj Virinoj, Liberpensuloj, k.t.p.

Norvegiujo.—En Bergen S-ro Adjunkto Einar Schibbye kreis grupon kun 150 personoj en 4 kursoj; unu el ili kalkulas 70 lernantojn. La fama germana Ĥemiisto, P-ro Ostwald, vizitis Kristiana'n, kiel gastulo de la Kristiana Scienca Societo de ĝia 50-jara jubileo kaj li uzis la okazon por fari paroladon pri Esperanto al la Studentaj Societoj. La parolado estas farita antaŭ granda aŭdantaro da profesoroj, studentoj, kaj la Kristiana Klubo per tio akiris multe da novaj anoj.

Nova Zelando.—Estas bone, ke la Esperantistoj celu uzi la lingvon por la komercaj aferoj. S-ro Reginald Mackinnon, *Esck-street, Invercargill*, dissendas cirkuleron pri ĉiusemajnaj produktaĵoj de tiu lando. Feliĉa lando, kie oni povas aĉeti bovaĵon kaj ŝafaĵon po 4 pencoj por funto aŭ malpli, kortbirdojn po 1 ĝis 2 ŝilingoj kaj kuniklojn po 6 pencoj por paro. Kredeble, ne ĉiu dommastro bezonas vivan, grasan, ŝafon po 25 ŝilingoj, nek 112 funtoj da ŝafsebo, sed se li iam tian bezonus sin turni al la supre nomita.

Svisujo.—En Zurich komenciĝis kurso, kiu estos tenata dufoje en ĉiu semajno, ĉar oni rimarkis ke lernantoj laciĝas, se oni tro prokrastas la finon. En Winterthur la grupo kalkulas 35-40 membrojn sed plendas ke la profesoroj kaj instruistoj, homoj kiuj devas alporti progreson, restas skeptikuloj. La grupoj en La Locle, kaj Chaux de Fonds tre sukcese organizis festojn. La dua, kvankam ĝi ne estis unujara, enhavas jam 250 membrojn. La Svisaj anoj eksciis kun ĉagreno la funebran informon pri la morto de S-ro Schneberger la amata patrino de la prezidanto S-ro Sneberger, pastro en Lüsslingen. La anglaj samideanoj dezirus unuigi kun siaj Svisaj amikoj en ilia esprimo de vera simpatio al la Svisa prezidanto.

H. W. S.

BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INCORPORATED).

The annual general meeting (the first since the incorporation) was held at Essex Hall, Strand, on the 10th June, Dr. John Pollen, the President, being in the chair, supported by his Vice-Presidents, Mr. Felix Moscheles and Dr. O'Connor, and by the hon. sec., Mr. Nicholl, the hon. treasurer, Mr. Chatterton, and the secretary, Mr. Clegg.

The President's opening speech was terse, witty, and enthusiastic, and was received with befitting appreciation. He congratulated the Association on its year of excellent progress, and referred with satisfaction to the definite incorporation of the members under the Companies Act. This important step started the Association on a new phase of its already very promising career. The new Corporation commenced its first year of office with a balance of £215 to the credit of Capital Account.

Dr. Pollen said he had once more the pleasure of publicly declaring his belief that in the history of our reform the first stage of "scorn and ridicule" had been passed, and that we were entering on the second stage of "reasonable discussion"—more intelligently friendly to the idea of an international tongue.

All reforms worth anything had to pass through these two initial stages before they reached the stage of "ultimate adoption," and the comparative rapidity with which Esperanto had emerged from the first stage was an involuntary tribute to the commanding genius of Zamenhof and to the glorious ideal he had set before mankind.

There were some who thought we had not yet completely got through the stage of ridicule, but no one objected to the gentle chaff of *Punch*. This would doubtless continue; but it might safely be declared that from the serious Press and from the thoughtful journals of the leading nations, and from the peoples themselves, we had nothing more to fear in the shape of persecution or scorn. Dr. Pollen prophesied that before fifty years had passed away monuments would be raised to Zamenhof in every civilised country in the world, although he himself (modest genius as he was) cared for none of these things. There were only two points Dr. Pollen desired to press particularly on the notice of the public, and one was that there was no fear of any changes being made in Esperanto, and the other was that Esperanto was not the rival of English, or any other natural or national tongue whatever. Such was the genius of Zamenhof that his work was complete in every detail, and stood in no need of change. Under the natural law of development, improvements might in course of time be demonstrated as desirable. But that time was very remote, and until the language was firmly established, and until we had a central authority whose linguistic decrees would be accepted without dispute by the whole world, there was no thought of any change or even of improvements in the tongue. To conquer we must be as true as steel to the Esperanto of Zamenhof, and our watchword was "Constancy and Hope." It was too early yet to make any improving movement even along the direct and seemingly safe path of "neologisms"!

As to English becoming the international language of the world, Dr. Pollen pointed out how remote and visionary such a contingency really was. We must judge the future from the past, and all the past of the English tongue revealed that it would take generations upon generations before English could become, in

any true sense of the word, "international." There was even a modern tendency to divide English, and was it not true that on the Continent of Europe interpreters were advertising themselves as capable of speaking in English and (!) American?

Meantime Esperanto was ready, and needed only convention to render it immediately international. Dr. Pollen pointed to the code of maritime signals as showing what convention could do, and explained that the adoption of Esperanto would enable the nations to intercommunicate with their vocal organs, just as they now did by flags and other conventionally-accepted symbols.

This consideration led the President to an account of what could be done by the Esperanto flag in the cause of propaganda. He described his recent journey to the East with the flag of Hope unfurled. How he had first spread it on the quarter-deck of the good P. and O. ship *Marmora* in the presence of their Royal Highnesses the Duke and Duchess of Connaught and the Princess Patricia; how the Pyramids had looked down with amazement on the symbol, and how the Sphinx had seemed to wink approval at this reading of its riddle! How he had run the Esperanto flag up to the foremast of the ss. *Ismailia* on his selection as Hon. Admiral of the combined fleet of international ships at Jeddah. How he had preached the gospel of unity of tongue to the pilgrim followers of the Prophet Muhammad on the road to Mecca. How the flag had streamed over Aden, and had excited curiosity amidst all the nautical quidnuncs of Bombay, as it came fluttering up the harbour, flying from the foremast of the old P. and O. steamer *Coromandel*—the "Shahnur" of modern days! Thence the flag was borne throughout India, and waved in train, in drawing-rooms, in schools and colleges, and over factories, in the palaces of kings, and over the parades of Imperial troops. The flag everywhere proved an admirable text for preaching the Gospel of Hope, and the people of India listened with approval, and many of the princes and leaders of the land promised to support Esperanto, and to remember the flag! Some bestowed handsome donations in aid of the cause, and had thus earned the thanks of the friends of Esperanto throughout the world and of this Association in particular.

The President concluded his remarks by alluding with gratitude to the splendid work that had been done by the various members of the Association during the year. He specially thanked Miss Lawrence for her constant self-sacrificing zeal, and alluded to the prolonged labours of Messrs. Cowper, Blott, and Lambert on the Legal Committee in connection with the successful incorporation of the Association, and to the good work of Messrs. Wackrill, Millidge, General Cox, and the other members of the Journal Committee, in the editing of *THE BRITISH ESPERANTIST*. He also expressed his obligations and that of the members to the secretary, Mr. Clegg, and to the hon. sec., Mr. Nicholl, and hon. treasurer, Mr. Chatterton, and alluded gratefully to the Rev. C. Rust and the two members of "the Trio" at Cambridge who were toiling so hard for the success of the third Congress on the 10th August next.

The President then formally moved the first resolution, viz.: "That the annual report and balance-sheet of this Association made up to the 30th April, 1907, now submitted be and are hereby accepted." This was seconded by Mr. Felix Moscheles, who made a short speech referring to the fact that the Association had performed its work almost without any financial aid. The resolution was put to the meeting and unanimously accepted.

With regard to the accounts, it was pointed out by the Secretary that although the figures dealing with

THE BRITISH ESPERANTIST showed that the Journal was published at a considerable loss, the financial position of the Official Organ might really be considered quite satisfactory. Approximately, three pages of the Journal are devoted each month to advertising the books sold by the Association, and if a reasonable charge for this had been made against "Publications" account, the apparent loss would be quite wiped off.

Dr. J. C. O'Connor then formally moved the following: "That Messrs. Schultz, Comins and Co., of 50, Cannon-street, E.C., be and are hereby appointed auditors of the Association for the ensuing year at a remuneration of 10 guineas." Mr. G. W. Bullen seconded the resolution, and pointed out that Messrs. Schultz, Comins and Co. had magnanimously undertaken this work free of charge in the past, and that what we were now undertaking to pay them was really more of the nature of an *honorarium* than of a remuneration. The resolution was put to the meeting and unanimously accepted.

The result of the examination of the ballot lists was then announced as follows:—

President: Dr. John Pollen, C.I.E., &c.

Vice-Presidents: Dr. J. C. O'Connor, Mr. C. E. Cowper, Major-General Geo. Cox, Mr. Felix Moscheles, Mr. J. Rhodes, Rev. J. C. Rust, Mr. W. T. Stead, and Mr. J. M. Warden.

Hon. Treasurer: Mr. B. Chatterton.

Hon. Secretary: Mr. S. Nicholl.

Ordinary Councillors: Messrs. A. Blott, G. J. Cox, F. W. Green, Dr. Preston Lewis, and W. E. Rolston.

Special Councillors: Messrs. G. W. Bullen, Dr. J. C. O'Connor, J. Ellis, D. H. Lambert, H. B. Mudie, and A. E. Wackrill.

The meeting concluded with votes of thanks to the officers of the Association and to the chairman of the meeting.

S. NICHOLL, *Hon. Sec.*

Several gatherings for the week-end, in connection with the Annual General Meeting, organised by Mr. Cowper, afforded, to members from the country, pleasant opportunities of social intercourse with each other, and with dwellers in and around the metropolis.

On Saturday evening, June 8, a party of a dozen dined together at Lyons' Popular Café, and passed a very pleasant evening.

On Sunday afternoon, in spite of the threatening weather, a score of *samideanoj* gathered at Hampton Court; though the Palace afforded shelter during one or two showers, the visit was unfortunately somewhat marred, and considerably curtailed by the rain.

On Monday morning, a small group discussed the pictures at the Royal Academy in Esperanto, and lunched together at the *Eustace Miles Restaurant*. On Monday afternoon the Annual Conference for the reading and discussion of papers in Esperanto took place. The chief themes for discussion were various points connected with teaching the language, introduced by Mr. Lambert, Mr. Ledger, and Mrs. Nicholl. Mr. Torpey, Mr. Cox, and Mr. Cowper (who occupied the chair) introduced various other points for discussion. At 5 o'clock an adjournment was made to Slater's Restaurant, where tea was served to a sociable party numbering between twenty and thirty. C. E. C.

Notice is hereby given that a Meeting of the Council of the B.E.A. (Incorp.) will be held at 13, Arundel Street, Strand, London, W.C., on Monday, July 8, at 6.30 p.m.

COUNCIL MEETING.

The first meeting of the new Council was held immediately after the General Meeting on June 10.

Present:—Dr. J. Pollen (President), Miss Lawrence, and Messrs. Blott, Bullen, Cowper, Major-General Cox, G. J. Cox, Lambert, H. Lowe, Maitland, Moscheles, Nicholl, Phillimore, Rolston, Rust, Southcombe, and Warden.

The various committees were elected for the coming year, as follows:—

Emergency.—All the Officers of the Association plus the Chairman and Secretary of each of the other committees.

Journal.—Mr. E. A. Millidge (Editor and Chairman), Miss A. Schafer (Secretary), Miss Lawrence, and Messrs. H. Clegg, Major-General Geo. Cox, H. B. Mudie, and A. E. Wackrill.

Book Sales.—Messrs. G. W. Bullen and G. J. Cox.

Censor.—Messrs. General G. Cox, D. H. Lambert, E. A. Millidge, H. B. Mudie, S. Nicholl, Rev. J. C. Rust, H. W. Southcombe, J. M. Warden, and A. E. Wackrill.

Education.—Mr. S. Nicholl (Chairman and General Secretary), Mrs. Haythornthwaite, Misses A. Schäfer, and E. A. Lawrence, and Messrs. C. E. Cowper, F. W. Green, G. Ledger, D. H. Lambert, E. A. Millidge, J. C. Neil, W. Phillimore, W. Pope, J. Wilson, and J. F. H. Woodward.

Legal.—Messrs. A. Blott, C. E. Cowper, and D. H. Lambert.

Examination.—Messrs. J. Blaikie, G. W. Bullen, J. Ellis, D. H. Lambert, E. A. Millidge, J. Rhodes, Rev. J. C. Rust, A. E. Tillard, J. M. Warden, and A. E. Wackrill.

It was decided to print a list of members of the B. E. A., as soon as we have 500 fully qualified members.

With regard to the Anglo-French Exhibition in London and Edinburgh in 1908, Dr. Pollen and Messrs. Cox and Rolston were appointed a committee, to make any arrangements they considered advisable with the London management.

S. NICHOLL, *Hon. Sec.*

UNUICOTA FESTO DE "YORKSHIRE" ESPERANTISTOJ, HARROGATE, JULIO 20an.

La festo komenĝigos ĉirkaŭ la 3a horo. Gegrupanoj kunvenos en la stacidomo kaj iros al la "Stray," kie granda kunveno okazos. Tien ĉi ni altiros la publikon kaj aktive propagandos nian aferon buŝe, literature, kaj per paroladoj farotaj angle kaj esperante de S-roj Rhodes, Ellis kaj Maréchal. Ni ankaŭ kantos kelkajn la plej konataj kantoj je la 4a. Ni promenos en la "Valley Gardens" kaj intermiksante inter la vizitantoj al la urbo ni interparolados, dum agrablaj muziksonoj flugas al niaj oreloj.

5.15. Temanĝo en la Skotaj Teĉambroj, Parliament-street.

6.7. Vizitoj por rigardi la Kursalon kaj "Royal Baths" (laŭ permeso de la Urbeŝtaro).

7.30—9.30. Koncerta and Societa Festo en la "Western College."

Ni nun petas de la fervojaj kompanioj specialajn biletojn je rabatita kosto por la vojaĝo.

La solaj elspezoj estos la kosto por la teo (1s.) kaj la fervoja bileto.

R. H. SWAINSON.

LIBRARO KAJ GAZETARO.

La Ĉiutaga Vivo, Esperanto Lernolibro, verkita de Profesoroj Fr. Swagers kaj Ad. Finet.—Tiu ĉi lernolibro instruas la lingvon mem, ne la arton babiladi pri ĝi. Tre bone ni scias, ke kelkaj homoj vidas en Esperanto nur kvazaŭ gramatikan kegludejon. Eĉ ne volante posedi la lingvon kaj tute ne komprenante, kia ĝi estas, ili trovas sian plezuron disputante pri tio, kia ĝi devus esti. Al tiaj homoj ni konsilas, ke ili ne legu tiun ĉi libron, ĉar ĝi ne taŭgas por iliaj Moŝtoj! Sed, kiu nur celas instrui lernantojn en la praktiko de la lingvo, per facilaj paŝoj, kaj liveri al ili konvenan aron da ĉiutage uzataj vortoj kaj frazoj, tiu aĉetu unu ekzempleron, kaj baldaŭ li trovos sin mendanta pluajn por disdonado.—A. E. W.

Ordo de Diservo, de Pastro J. Cyprian Rust.—Tiu ĉi estas traduko el la Preĝlibro de la Angla Eklezio, kiu estas aprobita de la Episkopo de Ely, post konsilio kun Lia Ĉefepiskopa Moŝto, por la diservo, kiu okazos en Cambridge, dimanĉon, la 11an de Aŭgusto. La broŝuro, kiu konsistas el 30 paĝoj, enhavas ankaŭ esperantajn tradukojn (de diversaj verkistoj) de 26 himnoj el la *Himnoj Antikvaj kaj Modernaj*. La eltiraĵoj el la Preĝlibro estas bone tradukitaj, kaj la traduko de la 13a ĉap. el la 1a Epistolo al la Korintanoj estas bonega. Pri la himnoj, multaj el ili estas bele esperantigitaj, sed kelkaj estas iom malbonigitaj, almenaŭ laŭ nia opinio, per la troa forlasado de la fina vokalo de substantivoj. Pastro Rust ĵus skribis al ni:—“*En la Ordo de Diservo . . . unu artikolo de la Kredo Apostola estas okaze forlasita, nome: ‘kaj sidas je la dekstra mano de Dio, la Patro Ĉiopova.’ Permesu al mi certigi viajn legantojn kaj ĉiujn samideanojn, ke tio estas senintenca eraro.*”—G. C.

Hebrea Kalendaro, originala verko de Pastro Jakobo Bianchini. Broŝuro de 16 paĝoj. Prezo, 2 $\frac{1}{2}$ d.—Tiu ĉi verketo estas la unua el serio de Bibliaj studoj. La kalendaro estas tiu, kiun uzadis la Izraelidoj en la jarcento de Jesuo Kristo. La aŭtoro klarigas, ke, same kiel la mallumeco ekzistis antaŭ la lumeco, tiel la juda tago komenciĝis je la sunkuŝiĝo kaj finiĝis, kiam la suno ree subiris. Nur du tagoj el la semajno havis nomojn, t.e. la unua, *Sabato*, kaj la lasta, *Parascervo* (vendredo); la ceteraj oni nomis la *unuan, duan, trian, kvaran, kvinan*, post sabato. La monatoj komenciĝis kaj finiĝis ĉe la nova luno; tial, jaro konsistas el 354 tagoj kaj, por alĝustigi la sezonojn, 13-monata jaro okazis ĉiutrigare. La Hebreoj havis du jarojn—unu (la religian) kiu komenciĝis en Marto, kaj la duan (la civilan) en Septembro.—G. C.

Internacia Scienca Revuo (Junio).—“Pri la Konsisto de la Atomo kaj la Lego de Coulomb,” de H. Pellat; “Bibliografio Internacia” (sekvo kaj fino), de J. Hanauer; “Laciĝo en la Marŝado” (sekvo kaj fino), de André Broca. Tiu ĉi artikolo traktas pri la ordinara marŝado kaj flekseca marŝado. “Evolucio de P. Religia Ideo,” de D-ro A. Melin. Tiu ĉi artikolo estas respondo al tiu de D-ro Vallienne, kiu komenciĝis en la *Scienca Revuo* en la januara numero. Sub “Notoj kaj Informoj” ni sciigas, ke oni intencas krei matematikan revuon, kies teksto estos tute en Esperanto, kaj difinitan por matematikistoj de la tuta mondo. La nova revuo enhavos ĉion, kio rilatas al la teoria kaj pratika matematiko, mehaniko kaj teoria fiziko, en ĉiuj eblaj formoj.—G. C.

Brazila Revuo Esperantista (Majo).—Tiu ĉi estas la dua numero de la unua gazeto por la portugaliaj lingvanoj. Ni ĝojas vidi, ke ĝi povas doni nomaron de ne malpli, ol ses societoj kaj kluboj fonditaj en Brazilujo en la daturo de la lasta jaro. “Reviviĝo de P. Amo,” originale verkita de Murillo Furtado.—G. C.

Lingvo Internacia (Majo).—“Pri Plibonigoj.” Tiu ĉi artikolo, de la Redakcio, esprimas la samajn opiniojn pri la gravega temo de plibonigoj en Esperanto, kiel tiu de D-ro Zamenhof, “Pri Reformoj en Esperanto,” kiu aperis en *La Revuo* de la lasta monato. “Marcelin Berthelot,” traduko de D-ro Noel, de parolado farita de la mortinta mondfama ĥemiisto, la 24an de Novembro, 1901, ĉe la ceremonio organizita por festi lian 50-jaran sciencan jubileon; “Preĝo al la Tero,” versaĵo de J. Riddet-Colas; “Al Fundo,” de M. Verema; “Kiel Petro Intencis sin Savi el la Mondpereo,” amuza rakonteto de Zacherl Ch.; “Lingva Komitato,” raporto, de Th. Cart, pri la demando rilata al “Vortoj el la *Universala Vortaro*, kies tradukoj ŝajnas aŭ kontraŭdiraj, aŭ malĝustaj.” Tiu ĉi raporto enhavas liston de vortoj malĝuste kaj malkorekte tradukitaj francen. “Pri la Nova Vorto ‘Menso,’” de M. Nieger; “Pri la Vorto ‘Usono,’” de J. C. Wells. Tiu ĉi estas nova vorto por *Unuigitaj Ŝtatoj*, devenigita de la ĉefliteroj, “United States of North America.” En la aldono estas daŭrigata “Akvo Dormanta” (scena el la meksikana vivado), de L. Biart, esperantigita de Lotus. (Junio).—“Deklaracio de al Esperantistaj Gazetistoj.” La redaktoro publikigas la nomojn de dek kvar gazetoj, kies redakcioj ĝis nun aliĝis al la jena gravega deklaracio:—(1e) Klopodi por atingi en siaj gazetoj kiel eble plej grandan korektecon de la lingvo kaj obeadi la regulojn kaj Fundamenton de la Zamenhofs lingvo Esperanto. (2e) Eviti ĉiujn farojn aŭ diskutojn, kiuj celadus *iel ajn* ŝanĝi la Zamenhofan lingvon. (3e) Rekomendi nur eldonajn, verkojn, gazetojn, kiuj same obeas la regulojn kaj Fundamenton de la Zamenhofs lingvo; kaj se ili raportos pri aliaj, almenaŭ montri iliajn neakcepteblajn flankojn. “La Ŝtonoj, kiuj falas el la Ĉielo,” de Marcel Finot. “Aceptita Infano,” de Korolenko. Tiu ĉi historieto, tiel bone tradukita el la rusa de S-ro N. Kabanov, pravas kiel bone alfarita estas Esperanto por montri la strangajn parolmanierojn de ĉiu nacia lingvo, kaj samtempe esti facile komprenebla por Esperantistoj de ĉiuj nacioj. Tiajn esprimojn, oni ne povas nomi idiotismoj, ĉar ili estas nur la parolo esprimata per lingvaĵo, al kiu oni ne kutimas. Raporto pri la “Dua Kongreso de la Germanaj Esperantistoj” en la 12a de Majo. Listo de “Novaj vortoj en la dua eldono de la Germana-Esperanta vortlibro,” kun interesaj rimarkoj pri la uzado kaj formo pri kelkaj el ili. En la aldono troviĝas la datrigo de “Akvo Dormanta,” de L. Biart, tradukita de Lotus.—G. C.

Espero Katolika (Majo).—“Pri la Eklezio Anglikana,” de Pastro A. Richardson. Tiu ĉi artikolo priskribas la dogmaron de la tri partioj en la Anglikana (Angluja) Eklezio, la tiel nomita “Alta Eklezia” (High Church) partio, “Malalta” (Low), kaj “Larĝa Eklezia” (Broad Church) partio. La aŭtoro diras, ke la naturo, situacio, kaj opinio, kiuj interbatalas en la brusto de la Ŝtat-Eklezio Angla estas aferoj mal multe aŭ malĝuste konataj ĉe la plimultaj Katolikoj. “Preĝo al Mario,” verse esperantigita de J. Schroder; “Tolstoj kaj la Rusa Revolucio,” de Paul Deschamps;

"La Bela Magdaleno," gaskona legendo de F. Blade, tradukita de C. de Rey-Pailhade; "Sensacia Eltrovo," el *Biblia Revuo*, tradukita de Vo-Po-Lo.—G. C.

The American Esperanto Journal (Majo).— "Oni ne povas interparoli per si mem," el parolado pri Esperanto de P-ro G. B. Viles; "Esperanto in Commerce"; nekrologo pri la fama pariza okulkuracisto D-ro Emile Javal; "Pripensoj koncerne la Malfacilecon en la Lernado de Esperanto," de D-ro Max Talmy; "Esperanto in the American Press." Tiu ĉi artikolo, skribita angle, diras, ke la medicina profesio estas plene konscia pri la bezono de internacia lingvo. Ĝi faras citaĵojn el letero de americana konsulo: "Niaj fabrikistoj eble vekigos iatage por vidi anglajn, francajn kaj germanajn fabrikistojn ĉirkaŭkurantaj la mondon, fluante parolantaj Esperanton kien ajn ili iras, kaj ricevantaj grandajn mendojn." "La Langtondita Pasero," japana fabelo, tradukita de E. Asada, Japanujo; "Grammatical Explanations." Tiuj ĉi monataj klarigoj estas klare kaj simple verkitaj, kaj devas esti utilaj al multaj legantoj. "Skribu internacie." En tiu ĉi mallonga artikolo, Esperantistoj estas avertataj kontraŭ la blinda uzado de anglaj idiomatismoj. Ni kore konsentas tiun ĉi konsilon, ĉar tio, kio estas facile komprenebla por la angla Esperantisto, estas ofte sensencaĵo por la alilandulo. Daŭrigo kaj fino de "La Viro Senpatruja," de D-ro E. E. Hale, esperantigita de E. L. Robinson; "Nia Nomo," de T. Hunter, kiu ne aprobas alian adjektivon krom "Amerikana" por ano de Unuigitaj Ŝtatoj, kiu estas permesata de internacia uzado. Li konsilas, ke oni montru adjektive la kontinenton per *amerika*, sed lian nacion per *amerikana*; ekzemple, Peru estas *amerika* ŝtato, sed Texas *amerikana* ŝtato. "La Dua Psalmo," tradukita el la hebrea lingvo de Am.—G. C.

La Belga Sonorilo (16 Junio). — Eltiro el la oficiala protokolo de kunsido de la Reĝa Akademio de Belgujo je la 13a de Aprilo, pri la elekto de internacia helpanta lingvo. Post la diskutado oni voĉdonas. La plimulto opiniis favore pri helpanta lingvo. Ĝi opinias, sekve, ke la *Internacia Asocio de l' Akademioj* sin aljuĝu la elekton de tiu lingvo. "Sur la choix d'une langue auxiliaire internationale," de Paul Mansion; "Projet de révolution" (Chambres de députés, France); daŭrigo de "Al la Internacia Helpanta Lingvo," el *L'Indépendance Belge*, de Kom-to Lemaire, tradukita de Jos. Jamin.—G. C.

Juna Esperantisto (Majo).—En tiu ĉi numero la gazeto malfermas serion da konkursoj, en kiuj, ĉiuj ĝiaj abonintaj kaj eĉ legantoj povos partopreni. Daŭrigo de "Sinjoro Vento kaj Sinjorino Pluvo," de Paul de Musset; "Episkopo kaj Parolanta Birdo," de M. S. Rakitski; "La Malfermita Pordo," tradukis la lernantoj de S-ro Th. Cart; "Mastro kaj Servisto," dialogo el Erasmo, esperantigita de D-ro Vallienne; "La Formiko kaj la Cikado," versaĵo, de E. Robert.—G. C.

Verkaj ricevitaj ne supre preparolitaj: *Toeristen-Vereening "Esperanto," Handboek*, 1907, kun plena kaj tre interesa priskribo de nia lingvo, verkita en la holanda lingvo de Joh. H. Sandow; *L'Esperanto*, conférence aux officiers de l'école supérieure de marine, par M. Carlo Bourlet (6 pecoj, 0.25 Sm.); *Tra la Esperanta Literaturo*, 50 eliraĵoj kolektitaj de Prof. L. Giambene (1s. 2d., 0.60 Sm.); *La Muelilo kiu ne plu Turnigas*, trad. de René Badert (2½d.,

11 Sm.); *Guide Esperanto de la Croix-Rouge*, de L-to Bayol (1d., 0.05 Sm.); *La Universala Ŝlosilaro*, de E. Ĉefeĉ, la ĝis nun eldonitaj ŝlosiloj (sep) kune binditaj en unu tole tegita volumeto.

TUTMONDA LABORA SOCIETO.

Ĉiuj amikoj havantaj interesajn proponojn por prezenti, rilate al la "laborista movo," estas petataj ilin sendi kiel eble plej baldaŭ al la sekretario, S-ro P. Blaise, 4, rue du Bourg-Tibourg, Paris, IVe.

Ĉiuj bonaj ideoj estos disputataj dum la Kejmbriĝa kunsido. Inter aliaĵoj estos preparolataj:—

1°. La rimedoj uzotaj por disvastigadi Esperanton inter la gedungitoj.

2°. La fondo de sekcioj en ĉiuj landoj.

3°. La elekto de internacia konsilantaro.

Por klarigoj pri la societo, sendo de regularo, k.c., oni sin turnu al la supredonita adreso.

E. STOECKEL, Prezidanto.

Pro kelkaj malhelpaĵoj la Esperanta Ekspozicio en Bordeaux estis iom prokrastita. Sed la tiea grupo tute ne forlasis sian projekton kaj ree okupas sin pri ĝia efektivigo.

Oni do petas, ke mi rememorigu niajn amikojn pri tiu entrepreno tre utila por la propagando de nia afero.

Ĉiuj sendaĵoj (libroj, aŭŝoj kaj statistikaj dokumentoj) estas de nun akceptataj kun danko de S-ro Prof-ro Bergognié, 3, rue Jean-Burquet, Bordeaux.—SAM. MEYER.

La Esperantista Grupo de Tours (Francujo), dezirante pligrandigi la turismon kaj propagandi Esperanton en sia regiono, petas ke ĉiuj Esperantistoj (precipe la alilanduloj) bonvolu sin turni al la esperantistaj hotelmastroj kaj en Esperanto. Tiamaniere, en la jam Esperanton-parolantaj hoteloj oni pli ŝatos la lingvon; novaj hotelmastroj ĝin uzos kaj iom post iom Esperanto iĝos praktikata ordinare de la turistoj kaj de la vojaĝantoj.

PROVERBOJ

UZATAJ EN GERMANA LINGVO.

Tradukis JOH. SCHRÖDER, el Vieno.

Devi estas forta estro.—Pli bone malfrue, ol neniam.—Kiu semas venton, rikoltos ventegon.—Maldanko estas monda rekompenco.—Blinda fervoro nur malutilas.—Pluvon sekvas suno.—Tuja donaco, duobla donaco.—Vidu, al kiu vi konfidas!—Putraĵo allogas vulturojn.—Pasero en mano pli bona, ol kolombo sur turo.—Multe da kapoj, multe da sencoj.—Diru, kiun vi ŝatas kaj mi diros, kia vi estas.—Hodiaŭ mia sorto, morgaŭ via.—Homo pensas, Dio intencas.—Malfeliĉo pleje venas are.—Beleco for-estos, virto restos.—Iru al forĝisto, ne al fuŝforĝisto.—Kuraĝe riskito, duone gajnito.—Alia urbeto, alia knabineto.—Kia lando, tia kutimo.—Laboro ne hontigas.—Por honora la kareso ne ekzistas malpermeso.—Kie estas nenio, regnestro eĉ perdas la rajton.

PRI LINGVA LIBERECO.

Ĉar Doktoro Zamenhof antaŭ nelonge diris, ke eble li mem iam reparolos pri lingvaj plibonigoj "per vojo *natura*, *sen ia rompad*o de la *lingvo*," ne decus, ke ni tie ĉi parolus per ŝajne aŭtoritata tono pri ia flanko de la demando, kiun ankoraŭ ne traktis tiu, kiu ne sole kreis la tutan fundamenton de la lingvo sed ankaŭ restas ankoraŭ nun ĝia praktikanto kaj klariganto la plej lerta el ĉiuj Esperantistoj.

Sed sen timo kaj honto ni povas libere paroli pri tiuj flankoj de la demando, kiuj jam longe estas deciditaj, kaj en sama aludo klarigi al tiuj niaj legantoj, kiuj ankoraŭ ne proprigis al si la esencon de la demando, kion nome, laŭ nia opinio, ili povas kredi mem kaj instrui al aliaj sen danĝero por la afero, sed eĉ rekte por ĝia utilo.

Kion do ni intencas komprenigi, kiam ni ripetas la frazon: "Pri *reformoj* ni absolute *neniam* devas paroli (almenaŭ ĝis la tempo, kiam nia lingvo havos plenan legdonan sankeion de la registaroj)" ?

Kelkaj korespondantoj ŝajne kulpigas nin kvazaŭ tiu frazo celus forpreni de la Esperantistoj ĉiujn rajtojn, ĉiun liberecon, ĉiun kampon de persona agado, lasante al ili nur kolekton da stereotipitaj formoj, kiujn solajn ili devas serveme ripetade uzadi, pro timo surverŝigi sur sin la teruran malbenon de la puristoj. Tute kaj absolute ne! En la uzado de nia lingvo, ĉiu Esperantisto rajte ĝuas gradon de libereco, kiu eĉ ĉiu alia lingvo tute mankas eĉ por la plej eminentaj klerreguloj kaj akademiuloj; liberecon neniam postulitan, eĉ tiuj lingvoj, eĉ de la lingvanoj mem; liberecon tute mirindan kaj antaŭe ne enpensigblan.

Tuŝante la ordon de vortoj, ni demandas, en kia alia lingvo de la mondo ĉiu fremdulo povas ordigi siajn vortojn laŭ sia nacia aŭ genta maniero, kaj tamen esti certa, ne sole ke oni komprenos lin sed ankaŭ ke li tiel bone parolas la lingvon, kiel la plejmulto da spertaj parolantoj? Kompreneble, oni scias, ke la unue renkontita vortordo ne estas nepre la plej logika kaj klara, kiun oni povus trovi; grade malvolvigas kaj perfektigas, en tiu rilato, logika internacia stilo, pli taŭga kaj povanta ol ĉia nacia vortordo. Sed tie ĉi ankaŭ ĉia Esperantisto havas plenan liberecon kunhelpi en la malvolvigado, ne per senfina diskutado pri ĝi, sed per la forto de nur tio, ke li kutime esprimas tion, kion li devas diri, laŭ la frazarango, kiu al li ŝajnas la plej klara.

Tute egale rilate al la demando de vortofarado kaj vortelektio. Per rektaj vojoj, ĉiu kaj ĉia Esperantisto jam havas plenan rajton tuj

fari al si per la kunigado de radikoj, prefiksoj, sufiksoj kaj gramatikaj finiĝoj la ĝustan vorton, jen verbon aŭ adverbbon, jen substantivon aŭ adjektivon, kiu en la momento la plej konvene taŭgas por montri lian penson. Se nur tiu vorto estas konforma al la plej simplaj leĝoj de la logiko, neniu povas rifuzi ĝin kaj diri al li: "tiu vorto ne ekzistas, ĉar la eminentuloj ne uzas ĝin," ĉar li povus simple respondi: "ĝi ja ekzistas, ĉar mi plenrajte kreis ĝin!" En kia alia lingvo de la mondo vi havas tian liberecon? Ni bone memoras, ke en la unua tempo de nia koniĝo kun Esperanto, kiam ni tralegis la liston de la senfinaj riĉegoj, kiuj staras pretaj por nia uzado, sento kvazaŭ de malespereto premis sur nian koron, sento simila al tiu, kiu premis sur la korojn de multaj negraj sklavoĵoj en Ameriko, kiam subite oni donacis al ili la liberecon. Ili tute ne sciis, kion fari per ĝi, kaj petegis siajn antaŭajn mastrojn kompleze repreni ilin en sklavecon. Sed oni respondis al ili: "Ne! La horo de libereco jam sonis por vi, kaj jam neniam vi havos la rajton esti sklavoĵoj!" Notu bone la sekvon de tiu okazintaĵo: Kelkaj el tiuj ekssklavoĵoj tiel bone sin alfaris kaj alkutimigis al siaj novaj kondiĉoj, ke baldaŭ ili komencis kritiki la amerikan Konstitucion, plendante, ke ĝi ne estas perfekta ilo por feliĉigi ĉiujn landanojn de la Ŝtataro. Ili volis elradiki la enradikiĝintan arbon de la Konstitucio por ĉarpentigi ĝin en diversajn fantaziajn formojn. Terura kaj pereiga propono!

Tiel ankaŭ kun la lingvo Esperanto. Ĉe la unua ekvido ĝi ŝajnas proponi al ni liberecon tro plenan por la homoj alkutimigintaj al la sklaveca frazripetado, la ĉerka malvasteco, la kaprompaj malfacilaĵoj de la naturaj lingvoj. Sed jam, antaŭ ol ni plene komprenas la mirindan vastecon de la posedaĵo, kiun al ni oni tute libere donacis, antaŭ ol ni akiris sufiĉan sperton por uzi la lingvon por ĝia propra kaj difinita celo (la interkompreno de la popoloj, ne la provizo de ia logika sistemo por okupi la klerulajn disputantojn), eĉ en la unua tagodeko de nia konatiĝo kun la afero, ni, hometoj, nepre ekvolas subfosi kaj ŝanĝi la fundamentojn de la konstruaĵo, konstruaĵo la plej fortike fondita, kiun iam en la daŭro de la amonda historio fondis homaj manoj sub la gvido de la homa cerbo kaj sub la influo (kiel ni nepre devas kredi) de Dia inspiro.

Pri la konstantaj plibonigoj de ĉies propra stilo per ĉies propra kaj konstanta penado kaj per ĉies alproprigo al si de ĉio, kio ŝajnas al li la plej bona en la praktiko de la aliaj, kiel ankaŭ pri la plibonigoj per la vojo natura de "neologismoj kaj arĥaismoj," ni hodiaŭ ne parolas. Pri ĉi tio ĉiu povas legi en la "Fundamento de Esperanto."

Sed tiaj plibonigoj tute ne estas reformoj, se per *reformo* oni komprenas la pereigan tuŝadon de la lingva fundamento, sur kiun konstruante la tuta Esperantistaro jam de longe laboras por rilatigi la tutan mondon al la simpla kaj praktika ideo de lingvo internacia.

Komprenante do la vorton *reformo* en tiu senco, ni povas diri al niaj legantoj, ke, kiam ni ripetas la frazon: "Pri *reformoj* ni absolute *neniam* devas paroli (almenaŭ ĝis la tempo, kiam nia lingvo havos plenan leĝdonan sankcion de la registaroj)" ni deziras komprenigi nur unu solan aferon, nome:

Pri reformoj ni absolute neniam devas paroli (almenaŭ ĝis la tempo, kiam nia lingvo havos plenan leĝdonan sankcion de la registaroj.)
A. E. W. (8,013).

SOMERA KOKETECO.

Estis apud la marbordo,
Sur sablaĵo mi sidiĝis;
Ŝi, spirito de malordo,
Min subite proksimiĝis.
Aŭdis mi mallaŭtan ridon,
Jen vizaĝo amuzita,
Kiu ravis mian vidon
Sunradie enkadrita.
Ŝi nenian timetecon
Montris, sed tuj ekbabilis;
Akirante plu bravecon
Baldaŭ per serĉado brilis.
Jen ŝi mokis, jen karesis—
Ĉu ŝi estis sorĉistino,
Teorigi mi ne ĉesis,
Aŭ ja nur koketulino?
Sed neniel vi kulpigu
Ŝiajn nekutimajn farojn
Kaj riproĉojn silentigu,
Ĉar ŝi havis nur ses jarojn.

D. H.

PRI PREĜEJAJ SONORILOJ.

Rilate al la supre nomita artikolo en nia lasta numero, ni bedaŭras, ke la tri linioj sekvantaj estis erare forlasitaj el la vicaro de ciferoj. La kulpo tute ne estas tiu de la verkisto kaj, esprimante al li nian bedaŭron, ni ankaŭ petas, ke la legantoj pardonu al ni ian malfacilecon de kompreno de ĝi kaŭzitan.

1 3 5 2 6 4
3 1 2 5 4 6
3 2 1 4 5 6 k.t.p.

La linioj estas la tri lastaj.—*Redakcio.*

RUBAJJAT DE OMAR' ĤAJJAM—KŪZA NĀMA.

Ree aŭskultu, mi petas.—Iun Vesperon ĉe l' fino
De Ramadano kaj antaŭ ol venis la luno plibona,
En la butik' de l' potisto mi staris sen homa
kunulo,

En la popol' el argilo, laŭ vicoj apude metita.

Stranga afero ĝi ŝajnos!—ke, inter la aro
teraja,

Kelkaj ja povis paroli sed multaj aliaj neniel,
Kaj el unuaj jam unu malpaciente ekkriis,
"Kiu Potisto?" mi volas demandi, "kaj kia la
Poto?"

Tiam aldiris alia: "Ho! certe ne tute sencele
Estis la mia substanco el tero komuna prenita,
Por ke la lerta de mi modelinto, la formen
doninte,
Nur min denove frakasu kaj ree kun tero
kunmiksiu."

Diris alia: "Ho! eĉ ne petola knabeto dezirus
Rompi kalikon, el kiu li trinkis en horo feliĉa.
Ĉu do ĝi estas kredinda, ke vazon de Li for-
maditan

El fantazio kaj amo Li poste freneze detruus?"

Tiun neniun respondis sed, post silentado, ekdiris
Iu vazeto farita laŭ iom malbela modelo:—

"Oni min mokas, ĉar kurba kaj dekliniĝinta
mi estas.

Ĉu do la man' de l' Potisto la min preparinta
skuiĝis?"

Diris alia, "Pri malbonhumora gastestro mi
aŭdis,

Kies vizaĝon la fulgo infera terure nigriĝis;—
Jes eĉ pri iu severa elprovo kuraĝas paroli
Kelkaj personoj"—"Sensece;—Li estas
bonulo—ne timu."

Tiam proponis alia kun longe spirata sopiro:—
"Mia argila substanco pro long forgeso sekiĝis,
Tamen per bonekonata likvoro min nove
plenigu

Eble, mi kredas, revenos en min la forteco
antaŭa."

Tiel dum vazoj kaj potoj la unu alian
parolis,

Unu ekvidis luneton jam longe de ĉiu serĉatan;
Kaj ekpuŝetis la unu alian, kriante "Frateto,
Paŝon aŭskultu de l' vinoportisto ĝis kelo
iranta."

Rimarko.—En la fasto monato Ramadano
devas Mahometanoj fasti ĝis apero de la nova
luno.

Esperantigis G. L. BROWNE.

INTER GLACIMONTOJ.

Originale verkita de H. E. BOORD.

Antaŭ kvin jaroj, mi vizitis Nov-Zelandon kune kun mia fratino, vojaĝante tien laŭ la Promontoro de Bon-Espero. Foje, mi memoras, ke mia fratino demandis de la ŝipestro, ĉu ni eble ekvidos glacimonton. Serioze balancante la kapon, li diris, "Mi esperas neniom vidi da ili, fraŭlino; ni ne amas glacimontojn, ni maristoj." Tamen, estas la vero, ke, el ĉio en la mondo, mia fratino deziris vidi glacimonton.

Maloportune pro tio, ŝi edziniĝis dum nia tiea restado; kaj mi revenis sole Anglujon en vaporŝipo naĝante preter *Cape Horn*. Mi enŝipiĝis la 15an de Aŭgusto—plenvintro je la antipodoj.

La kvinan tagon de la vojaĝo, mi marŝis kun aliaj vojaĝantoj antaŭen kaj reen sur la ferdeko. La malvarmo estis akra—tranĉa; eĉ la sala akvo, kiun oni uzadis por lavi la ferdekojn, glaciigis, kaj ni devis esti tre, tre singardaj por eviti glitadon. Oni sentis en la aero tion, kion la maristoj nomas, "odoro de glacio."

Ĉe la manĝado tiuvespere, iu alportis al la ĉefoficiro letereton, kaj li tuj foriris de la salono. Post kelkaj momentoj, la ŝipestro ankaŭ kviete lasis sian seĝon kaj sekvis lin. Komprenoble ni ĉiuj tre ekscitiĝis, kaj des pli multe, kiam baldaŭ la sciigo, ke granda glacimonto aperis antaŭ la ŝipo, disvastiĝis inter la gevojaĝantoj. Pensante, ke eble mi neniam plu vidos iajn glacimontojn, mi eniris en mian kajuton, kaj vestis min per la plej dikaj surtuto, mantelo, lankasko, k.t.p. (ne ridetu, kara leganto! la ĉefoficiro havis sian piedfingregon frostita), kaj spite la malvarmego mi tiel prezentis min sur la ferdeko.

Jen, maldekstre, starante el la maro, kiel ia neklara fantomo en la mallumo, estis efektive grandega glacimonto, ŝajne tre proksime de la ŝipo. Pasis duono da horo, kaj ni prisciĝis la ĉirkaŭestadon de kvin glaciaj pecegoj—jen, sep—jen, dek du—kaj, je la horo de kuŝado, oni certigis nin, ke ne malpli ol dek sep glacimontegoj naĝas kun ni preskaŭ apud la ŝipo.

Tio estis nek tute agrabla nek kuraĝiga!

Feliĉe, ni ĉiuj povis absolute konfidi je la lerteco de la bona ŝipestro kaj de lia oficiraro; kaj miaflanke, kuŝinte, mi tuj ekdormis—tamen, jam pretiginte miajn felvatitajn botojn kaj felan mantelon, en kies poŝojn mi metis boteleton da brando kaj bovafajn pastelojn—kaj mi nenion konsciis ĝis la mateno.

Matene, rigardinte tra la kajuta fenestro, mi certigis, ke ni vere estas meze de arego da glacimontoj, kiuj faris kurson kun ni.

Certe estas, ke en la nokto ni evitis timi-

gantari danĝeron, kiu minacis la ŝipon; sed—eble feliĉe—neniu el la vojaĝantoj, ĉe la okaza horo, eksciis pri tio. La ŝipestro—kiu ne pro ia kaŭzo en la daŭro de dek unu horoj forlasis la ponteton kaj kiu ŝajne plimaljuniĝis dudek jarojn, kiam ni poste revidis lin—diris, ke unufoje la ŝipo estis enironta inter du glaciaj pecegoj (kiel li kredis). Estis tiam la plej malluma nokta horo—tuj antaŭ la tagiĝo—kiam li ekrimarkis strangan ondetadon de la akvo, kvazaŭ ĝi fluas super malebenaĵo. Tuj, kiel fulmo, li ordonis, ke oni duonrapide returnigu la maŝinojn, tiamaniere, ke la ŝipo ekiru dekstren. Dank' al Dio, tio estis ĝustatempa; ĉar ĝi estis *unu sama glacimonto*, kies mezo estis defalinta, lasante nevideblan unuiĝon sub la akvo. Se la ŝipo estus antaŭirinta, sen ia dubo ĝi frakasus sur tia amaso da glacio.

Oni diris, ke "la tri danĝeravertoj" sonis dum tiu epizodo; sed mi ne aŭdis tion. Oni ankaŭ diris, ke la ŝipanoj estis kunvokitaj sur la ferdeko, havante siajn landrapojn, kaj pretaj por helpi al la vojaĝantoj eniri en la boatojn. Tio, kredeble, povas esti. Sed "oni diras" tiom da strangaj aferoj vojaĝante, kaj ili ne estas ĉiam kredindaj.

Mi estas kore dankoplena, ke mi ne devis eniri en la senkovrajn boatojn. Figuru al vi, kia estus tio! Vintrameze, malproksime de Nov-Zelando je kvin tagoj de vaporveturado, kaj ĉirkaŭ sesdek du gradoj sude de la Ekvatoro! Kaj krom tio, tre kredeble ni renkontus nenian ŝipon antaŭ ol pasis multe da semajnoj; [ĉar tiujn marojn oni vintre malofte vizitas. Mi estas certa, ke la malvarmo mem mortigus min.

Tamen, malgraŭ ĉio, mia fratino estis prava, kaj la glacimontoj estas vidaĵo rigardinda, bela, kvankam teruriganta.

Post tri tagoj ni foriĝis de niaj glaciaj najbaroj. Kiom da ili ni interpasis? Unu momenton, kiam mi estis foje sur la ferdeko, mi mem kalkulis tridek kvar je ambaŭ flankoj; kaj kunkalkulinte, oni taksis, ke ni interpasis pli ol 1,200 glacieregonojn. Estis ja mirinde! Sepcent sep el ili estis notitaj kiel eksterordinaraj grandeguloj. Kvar ĝis ses cent futoj super la mara nivelo estis ilia kutima alteco; kaj unu el ili eĉ atingis altecon de okcent futoj. La legantoj rememorigos, ke la glacimontoj havas sub la akvo sepoble (aŭ, laŭ Captain Scott de la *Discovery*, nur kvinoble) sian supran alton.

"Jen tio nin haltigas!"

Cetere, oni ne atendis renkonti iujn ajn, ĉar estis tro frue en la sezono. Kutime ili ne veturas norden antaŭ la monato Septembro aŭ Oktobro. Nek la ŝipestro, nek iu el la maristaro iam antaŭe vidis samtempe tiom da glacimontoj, nek ankaŭ tiel grandegulojn, kiel

tiuj ĉi. Oni povis nur konjekti, ke eble terura tertremo estis okazinta ĉe la ĉirkaŭaĵo de la Suda Poluso (kie ekzistas konataj varmegaj fontoj), kaj ke tio ellasis la nun renkontitajn glaciajn pecegojn.

Ĉu la glacimontoj estas vere belaj? Nerefuteble, jes! Ili ankaŭ multe diferencas inter si; sed ili estas ĉiam belaj kaj mirindaj. Unuj similas al elegantaj palacoj aŭ ruinigitaj kasteloj; aliaj rememorigas nin pri la krutaĵoj de Dover, aŭ pri vilaĝo kvazaŭ sidanta sur svisa monto. Kelkaj preternaĝas ŝarĝitaj de neĝo; aliaj brilas hele en la sunradioj, montrante ĉiujn kolorojn de la ĉielarko en siaj glaciaj kavernoj.

Jes, efektive, la glacimontoj estas belaj; sed memvole, mi ne volus interpasi ilin denove.

Estas domaĝe, ke mia fratino ne tie estis anstataŭ mi!

LA DU POMOŜTELANTOJ.

Verkita de J. C. RUST, el Soham.

En la ĝardeno de Sinjorino Martino staris pomarbo, kiu ĉiuaŭtune prezentis multegon da belaj fruktoj. Ĝi fariĝis ĉiuaŭtuna tento por la knaboj en la ĉirkaŭaĵo. Sed ĝi ne estis facile atakebla. Flanke de la ekstera vojo la ĝardeno muro estis el brikoj ĝis la alteco de unu metro kaj duono, kaj laŭlonge de la supro de la brikoj estis fera palisaro alta unu metron. Tamen, unu tagon, du knaboj, Fredo kaj Johano, konspiris pri tiuj pomoj. Fredo estis iom malkuraĝa sed avida pomamanto; Johano estis kuraĝa—eĉ riskema—sed li ne ŝatis la ŝteladon. Fine al Fredo prosperis instigi Johanon al la entrepreno per la propono, ke li mem permesu Johanon stari sur liaj ŝultroj por surrampi la muron pli facile. Frue do la sekvintan matenon tio fariĝis. Johano rampis supren kaj, kun granda malfacilo, superĵetis unu kruron trans la palisaron kaj trovis mallarĝan starejon sur la brikoj en la alia flanko. Sed, kiam li transĵetis la duan kruron, la unua piedo formoviĝis, kaj li falis tutkorpe teren. Bedaŭrinde, tie kuŝis fasko da tiaj bastonoj, kiujn oni uzas por suprenrampigi la pizajn kreskaĵojn; kaj unu el la bastonoj estis fendita, tiel ke fendpeceto enpuŝis sin tra la ŝtrumpeto de la falanta knabo, kaj vundis lin ĝis sangelverŝo.

Sed Sinjorino Martino ankaŭ estis leviĝinta frue. Ŝi vidis la aferon el sia litoĉambro, kaj ekvokis sian servistinon, Anneton, kaj kune ili rapidis en la ĝardenon. Vidinte tamen la sangon, ilia kolero anstataŭiĝis per kompato. Ili kondukis Johanon en la domon kaj sidigis lin sur komfortan seĝon. "Venigu varman akvon," diris la sinjorino, "por lavi la vundon." Kiam

Anneto ekforiris, la sinjorino zorge eltiris la fendpeceton, kiu ankoraŭ restis fiksita tra la ŝtrumpeto. Ŝi iris al la provizejo kaj alportis pecon da sebo, per kiu ŝi diligente ŝmiris la lignaĵon kaj kuŝigis ĝin sur la superfajrejan breton. Tiam ŝi lavis la vundon per la jam alportita akvo kaj ĉirkaŭligis ĝin per tola bandaĝo. "Jen," ŝi diris, "la vundo baldaŭ resaniĝos, ĉar mi ofte jam pruvis ke, se oni ŝmiras la vundilon, ne estas necese fari ion pri la vundo mem, escepte ke, por eviti malkomforton, oni devas lavi kaj ĉirkaŭligi ĝin. Mi do donacos al vi du pomojn, kaj vi povos reiri hejmen."

Kaj efektive, ŝiaj vortoj veriĝis. La morgaŭan tagon Johano revenis, por diri ke la kruro fartas multe pli bone, kaj li ree ricevis du pomojn. Same en la tria kaj kvara tago. La kvinan tagon li deklaris, ke li estas tute resaniĝita, kaj li ricevis du pomojn la lastan fojon.

La sekvintan tagon Fredo aperis, kaj, trovinte Anneton, plendis ke li estas perdinta dek pomojn kaj diris, ke la sinjorino devas rekompeni lin pro tio. "Kiamaniere do vi perdis ilin?" demandis Anneto.

"Ĉar mi buŝe kontraktis kun Johano," li respondis, "ke mi ricevu egalan parton de la akirotaj pomoj, kaj li jam ricevis dek."

Sen ia vorto, Anneto donis al li survangon kaj forpuŝis lin el la domo, kaj poste ŝi raportis la aferon al la mastrino. Multajn semajnojn Sinjorino Martino ne povis decidi en sia spirito, ĉu elemento de justeco enestis en tiu pretendo de Fredo, kaj eĉ nun ŝi iom maltrankviliĝas, ĉiufoje kiam la memoro de tiu ŝuldo de dek pomoj entrudas sin en ŝiajn pensojn.

Rim.—Ekzemplo de la supre priskribita superstiĉo pri la ŝmiro de vundilo okazis en mia paroĥo antaŭ sep aŭ ok jaroj. Mia legantoj povas sin turni al la *Lay of the Last Minstrel*, de Sir Walter Scott, iii, 23, kun la aldonita noto.—J. C. R.

PRAKTIKA LOGIKO.

Vilaĝano (al sia revenanta filo): "Nu, kion, ĉion vi nun studis?"

Studento: "Logikon!"

Vilaĝano: "Mi ne scias, kion signifas ĉi tio!"

Studento: "Mi tuj klarigos ĝin al vi. Jen vi havas ĵusmomente tri kolbasojn. Mi al vi pruvos, ke ili estas kvin kolbasoj: kie estas tri kolbasoj, tie do samtempe ankaŭ du, ĉu ne vere? Du kaj tri tamen estas kvin. Do vi havas kvin kolbasojn!"

Vilaĝano: "Hm! Nu, atentu! *Mi* nun manĝos la tri kolbasojn kaj poste *vi* estos miaflanke permesata manĝi la du aliajn!"

ZACHERL CARL, *Passau*.

VIZITO AL MUZEO.

Originala Verketo de W. PHILLIMORE.

Antaŭ nelonge aro da Londonanoj faris viziton al la Naturscienca Muzeo en Kensington. Du junuloj el la grupo vagis kune tra la diversaj ĉambroj, admirante la bridojn, la nestojn de la birdoj, la insektojn kaj ceterajn, kaj mirante pri la signoj de la inteligenteco montritaj de tiuj ĉi malsuperaj specoj de la vivestaĵoj. Ĉirkaŭ la finiĝo de la tempo rezervita al vizitantoj, ili sin trovis en la ĉambro enhavanta la skeletojn kaj figurojn de la bestoj, kiuj ekzistis antaŭ la superakvego. La du junuloj interparolis multe kaj eble pensis pli multe, ol ili parolis, pri la grandeco kaj forteco de tiuj antikvaj bestoj. Tiom ili estis okupataj je tio, ke la horo kaj la signalo por la fermo de la muzeo pasis ne rimarkitaj de ili. Sed baldaŭ la silento kaj la vespera krepusko pensigis ilin, ke la horo de fermo nepre estas pasinta. Tial ili rapidis al la pordo, sed, ho ve! ili trovis ĝin fermita. Ili turnis la tenilon kaj trovis, ke la pordo estas ŝlosita, kaj ke ili estas malliberuloj. Kion ili devas fari? Ili frapis kaj aŭskultis, sed nenio aŭdiĝis krom la eĥoj en la dezerta ĉambro. Ili trarigardis tra la ŝlosiltruo, sed nenion vidis. Ili frapis kaj frapadis, sed neniu krom ili aŭdis, ĉar la pordistoj jam iris hejmen. Ili rigardis konsternite, silente, unu la alian. La horoj pasis, la nokto proksimiĝis, kaj ili pripensis pri la konsterno, kiu estos en la domo de la gepatroj, kiam la nokto alvenos sen ilia reveno. Longe ili staris kun silenta malespero. Post kelka tempo ili sidiĝis sur la planko.

Venis la noktomezo, kaj subite aŭdiĝis granda ekbruo. Ŝajnis al la junuloj, ke granda figuro de besto falis planken kaj pulvoriĝis.

Tiam stranga vido! El la pulvoro leviĝis granda insektaro, kiu zumadis ĉirkaŭ la junuloj kaj pikis al ili la haŭton. La junuloj svingis la brakojn ĉirkaŭ siaj kapoj kaj batis teren multajn insektojn, kaj poste surpaŝis per piedoj sur ilin, kaj mortigis kelkajn. Vidante siajn kunulojn senvivaj, la aliaj insektoj laŭte kriegis, tiam subite aperis tri grandegaj insektoj havantaj ok futojn da longeco, kaj similaj al grandegaj formikoj, kiuj kuregis al la junuloj kaj faligis ilin teren. Ili timis, ke la bestoj intencas surpaŝi sur ilin; sed anstataŭ fari tion, ili tiris la junulojn en specon de juĝejo, en kiu sidis juĝisto.

La juĝisto kolere rigardis la juĝotojn kaj demandis, "Kiuj vi estas?"

"Ni estas homoj."

"Sed tiu ĉi ne estas la horo por homoj ĉeesti la muzeon."

"Ni tion scias, via insekta Moŝto.

"Kial do vi ne eliris el la muzeo, kune kun la ceteraj homoj?"

"Ni ne sciis la horon, via Moŝto."

"Ĉu vi ne sciis pri la horo per la sunlumo?"

"Ne, via insekta Moŝto." Ĉe tio, la juĝisto sin turnis al siaj kunuloj kun rideto de mal-estimo kaj diris, "Tiuj ĉi estas inteligentaj homoj, kaj ili ne povas eltrovi la horon per la sunlumo."

Ĉiuj insektoj ridis pri tio. La juĝisto tiam daŭrigis la demandojn:

"Ĉu vi ne havas poŝhorloĝon?"

"Jes, via Moŝto, ni ĝin havas."

"Kial do vi ne rigardis ĝin?"

"Ni forgesis."

"Vi forgesis! Ŝajnas al mi ke la homoj ofte forgesas, kiam ili devus pensi."

"Ni pensis, ke—"

"Ho! vi pensis kaj vi forgesis! Tio estas iom rimarkinda, ĉu ne?"

"Ni volis diri, ke ni pensis pri alia afero."

"Pri kio do vi pensis?"

"Ni pensis, ke la pordisto venos por diri al ni la horon."

"Ho! mi komprenas. Al vi mankis infanistino. Ĉu via patrino scias, ke vi estas for? Kompatindaj homoj, mi multe kompatas ilin.

"Ho! miaj kunuloj, dank' al Dio, ke ni ne estas homoj." Tiam la juĝisto, sin turnante al la tri policanoj, demandis:

"Kion faris tiuj ĉi homoj antaŭ ol vi alportis ilin ĉi tien?"

"Se plaĉas al via Moŝto, ili mortigis kvar el niaj idoj, kiuj ludadis en la ĉambro."

"Abomene! Ili estas do krimuloj, malbonaj krimuloj. Ili estas ne malpli ol mortigantoj, kaj ili devos esti ekzekutataj."

"Sed, via Moŝto, ni nur tion faris por nin defendi."

"Kontraŭ kiu?"

"Kontraŭ la insektoj, kiuj pikis nin."

"Sed ili ja nur ludis: se ne plaĉis al vi la ludo, kial vi ne forkuris?"

"Ni ne povis, via Moŝto, la pordo estis ŝlosita."

"Ĉu vi forkurus, se vi povus?"

"Jes, via Moŝto."

"Vi aŭdas, miaj kunuloj ili estus foririntaj, se ili povus. Ŝajnas al mi, ke la homoj ne estas bravuloj."

"Ne, via Moŝto, oni scias bone, ke la homoj estas preskaŭ ĉiam timemaj ĉe la bestoj."

La juĝisto tiam eldiris sian juĝon: "Ĉar vi estas nur kompatindaj homoj kaj agis pro timo kaj ne malbonkore, mi savas al vi la vivon kaj kondamnas vin pasigi kvar monatojn en la malliberejo—t.e., po unu monato por ĉiu mortigo."

Ĉe tio ĉi la junuloj vekigis el sia sonĝo kaj atendis pacience la taglumon.

ANSWERS TO CORRESPONDENTS.

J. A. G.—Vi trovas bedaŭrinda la ekziston de kelkaj dusencaj radikoj, ekzemple: **akra**, dirita pri tranĉilo en bona stato por tranĉi, kaj **akro**, mezuro de terpeco; **rezoni**, uzi la spiriton por konkludaj celoj, kaj **re-zoni**, denove ĉirkaŭligi, k.c. Pli profite estus, laŭ nia opinio, anstataŭ bedaŭri pri tio, ĝoje miradi pri la malofteco de dusencaĵoj en komparo kun aliaj lingvoj. Jen kion diras la kritikantoj S-roj Couturat kaj Leau pri tiu demando. Montrinte, kiel malfacile estas eviti ĉiam la dusencaĵojn, ili diras: "La plimulto, feliĉe, ne povas servi kiel kontraŭsencaĵoj seriozaj kaj raciaj. Ĉiaokaze, oni trovas (en Esperanto) senkompare malpli da ili, ol en la konkurantaj projektoj; kaj, cetere, kiel diris S-ro Kerckhoffs por senkulpigi la dusencaĵojn de *Volapük*, konvenas lasi kelkan liberecon por la amantoj de facilaj ŝercoj." Cetere estas bone ĉiam memori, ke "Esperanto bonege kontentigas ĉiujn postulojn, kiuj povas esti farataj al lingvo internacia (eksterordinara facileco, precizeco, riĉeco, natureco, vivipoveco, fleksebleco, sonoreco, k.t.p.)," kaj ke estus malsaĝe fordoni, kiel oferon al unu malpli grava principo, aliajn pli gravajn. La ĉefa rolo de Esperanto ne estas servi kiel artifa embarasluĉilo, tial, kiam ni diras: **la tranĉilo estas akra**, ni ne timas la supozon ĉe kompetentaj personoj, ke ni intencas komprenigi, ke la dirita tranĉilo havas unu akron da surfaco, aŭ estas uzata por fortranĉi terpecojn. Fine la vorto **akro**, kiel ekvivalento de la angla *acre*, ankoraŭ ne estas definitiva akceptita. Ĝi estas, egale kun multaj aliaj, nur proponita vorto, facile anstataŭigebla per pli bona; plie ĝi havas intereson nur por la anglolingvaj popoloj, kaj eĉ ĉe ili ĝi apartenas al mezura sistemo nepre mortonta.—A. E. W.

ELTIRAĴO EL "LA CONQUÊTE DE L'AIR."

La Reims'a firmo "Ruinart Père et Fils," ĵus proponis novan premion de 12,500 frankoj, kiu estos donata al la unua aerveturanto, kiu, en ilo "pli peza ol la aero" sukcesos transpasi aere la maron "Manche" (English Channel) antaŭ la unua de Januaro, 1910. Tiu ĉi propono estas farata por ĉiuj, kia ajn estas ilia nacienco. Ni opinias ke estas utile publikigi, kiel dokumento, la sekvantan eltiraĵon el la ĵurnalo angla *The Car*, kiu prenis sur sin, samtempe kun la *Daily Mail*, sciigi publike la kondiĉojn de tiu ĉi sporta konkurso:—

£500 por la Transflugo de la "Manche."

Multaj premioj por aeronatoj devas esti aldonataj al la tabelo kiun mi publikigis, la lastan semajnon, en *The Car*.

La tre konata firmo de ĉampanvino, "Ruinart Père et Fils," kiu estas, laŭ kion oni diras al mi, la plej malnova en tiu ĉi komerco, proponis premion de £500, por la transflugo de la "Manche." Tiu ĉi ideo estas bonega; kaj certe, por tiu premio oni plej baldaŭ konkuros. Ne estos necese, ke la aeronato flugu pli alte ol kelkajn metrojn super la supraĵo de la maro; kaj, ĉar la eksperimento estos certe sekvata de multaj ŝipetoj kaj ekskursaj ŝipoj, ne estas tre atendeble ke la brava elpensinto dronos, aŭ renkontos baron kiu povus vundi lin.

La fakto ke la ekflugo povas esti farata, aŭ de la promontoro "Gris Nez" ĉe la franca bordo, aŭ de "Shakespeare's Cliff" apud Dover, estas ankoraŭ utila kaj estas plua tialo, kial oni povas facile opini ke la propono estas praktika.

La firmo "Ruinart Père et Fils" kaj ĝia estro, la Grafo de Brimont, devas esti gratulataj pri sia sporta iniciativo.

FAKO DE KORESPONDADO INTERNACIA. (F.K.I.)

Sub tiu ĉi rubriko oni enpresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses pencojn (70 centimojn, 60 pfojn) por trilinea enpresaĵo kiel sube (pli ol tri linioj po tri pencoj por ĉia komencita linio); ĉiu MEMBRO de l' Asocio havas la rajton fari unu enpresaĵon senpage. *Bonvolu skribi legeble, rekte al Redakcio.*

248. **Lee, London, S.E. (Anglujo).**—Fino M. Wells, 18jara, 102, *Eltham-road*, deziras korespondi kun alilandaj Esperantistinoj, kiuj ĉeestos la Kongreson.

249. **Le Mans (Francojo).**—S-ino Chaumier, 8, *rue Talotiers*, deziras koresp. kaj ilustritajn pkartojn interŝanĝi kun ĉiulandaj geesp-oj.

250. **Beziers (Francojo).**—S-ro F. Bernard, 18, *rue Amiral Courbet*, sendos kvindek poŝtmarkojn malsimilajn kontraŭ sama nombro da p. m. el anglaj kolonioj.

251. **Chicago (Illinois, U.S.A.).**—S-ro E. F. McPike, 1, *Park-row*, fervoja oficestro, deziras korespondadi kun ĉiulandaj fervojaj oficestroj.

252. **Los Angeles (Cal., U.S.A.).**—S-ro Albert Fox, *Examiner*, deziras korespondi iamaniere kun junaj geesperantistoj ĉiulandaj pri kia ajn temo, telegrafado preferata. Ĉiam kaj tuj respondos.

253. **Bloemfontein (Sud-Afriko).**—5374 Trooper E. Miller, "C" Squadron, 5th Dragoon Guards, *Tempe Camp*, deziras ricevi adreson de samideano en Sud-Afriko.

254. **Mendon (Mass., U.S.A.).**—S-ro Edgar Wheeler, *Box 24*, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun alilandanoj. Ĉiam kaj tuj respondos.

255. **Prairie du Chien (Wis., U.S.A.).**—S-ro Jules E. Carr deziras korespondadi kun alilandanoj.

256. **London (Anglujo).**—Fino F. R. Letters, 17, *Callow-street, S. Kensington*, deziras korespondi per poŝtkartoj aŭ leteroj kun alilanduloj.

257. **East Kirby (Notts., Anglujo).**—S-ro T. Rogers (juna), *Cemetery-road*, deziras korespondadi kun studemaj gefraŭloj, anglaj aŭ alilandaj.

258. **Bruxelles (Belgujo).**—S-ro F. Yerbanc, nova adreso: *rue de Serbie 6*, korespondas pri belaj naturaj kaj popolvivo, ĉiumaniere.